Salutmesaĝo al la 1-a Srilanka Kongreso de Esperanto, La 23-an de majo 2014

Esperanto, la Internacia Lingvo
එස්පෙරාන්තො, ජාත්‍යන්තර භාෂාව
எஸ்பெராண்டோ, சர்வதேச மொழி
Esperanto, the International Language

Saluton !
ආයුබෝවන් !
வணக்கம் !
Good afternoon!

Estimataj gastoj, ĉeestantoj kaj organizantoj,

Pro la sukcesa okazigo de la unua nacia Esperanto-kongreso de Srilanko mi gratulas vin kiel vic-prezidanto de KAEM, Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado.

Esperanto ligas korojn de homoj trans la limoj lingva, kultura kaj religia. Esperanto povas vastigi kaj profundigi komprenon inter homoj. Interkompreno estas unu el la gravaj eroj, kiuj donas bazon de paco kaj daurigon de paco.

Mi esprimas sinceran dankon kaj simpation al pioniroj, antaŭuloj kaj nunaj agantoj de Esperanto, kiuj semis, semas kaj kulturas ĝin en kaj por via lando.

Mi deziras, ke en atingita paco vi utiligu Esperanton por vi mem, por via socio kaj por interkompreno kaj amikiĝo inter sud-azianoj kaj geamikoj en la mondo. Kaj tio daŭru al la 3-a Sud Azia Seminario okazonta post du jaroj en via lando.

Plenan sukceson al la kongreso!

INUMARU Fumio

Vic-prezidanto de
Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM)
https://www.facebook.com/fumio.inumaru

pdf: http://goo.gl/k374SI - http://www.linguistic-rights.org/srilanko